

REVUE **SPIRITE**

Journal d'Études Psychologiques
Fondée par ALLAN KARDEC



Dia Leĝo aŭ Natura **La Devo**

Selektitaj Artikoloj

Jaro 169 | N- 22 | 2026

Ĉi tiu volumo enhavas kelkajn artikolojn el la Revuo Spirite de la jaro 169, Januaro 2026 numero 22. Ĉi tio ne estas kompleta versio. Tradukoj estas respondeco de la tradukinto.

TRADUKISTOJ KAJ REVIZIISTOJ EN ĈI TIU NUMERO

JOSÉ ROBERTO ALVES DE ALBUQUERQUE
GIVANILDO RAMOS COSTA
PAŬLO PIRES
J. KORNGOLD

Revue Spirite

Journal d'Études Psychologiques

Fondée par ALLAN KARDEC le 1er janvier 1858

Havaĵo de la Internacia Spiritisma Konsilio (CEI)
Logo et Marque Européenne enregistrée à l'EUIPO
(Office de l'Union Européenne pour la propriété
intellectuelle)

® Komerca marko 018291313

Mark française déposée à l'INPI (Institut National de
la Propriété Intellectuelle) sur le numéro

® 093686835.

LA REVUE
SPIRITE

Journal d'Études Psychologiques
Fondée par Allan Kardec le 1er Janvier 1858

Redaktita de

Federação Espírita Portuguesa

Praceta do Casal Cascais 4, r/c, Alto da Damaia,
Lisboa

ISSN 2184-8068

Depósito Legal 403263/15

© copyright 2026

Jaro 169

Nº22

CSI | Kvaronjara | Januaro 2026

Senpaga distribuo

Direkto (ISK)

Jussara Korngold

Kunordigo (FEP)

Vitor Mora Féria

Redakcia kunordigo

Sílvia Almeida

Skribo kaj provlegado

Cláudia Lucas

José Carlos Almeida

Web

Marcial Barros

Nuno Sequeira

Sandra Sequeira

Arto & Dezajno

Sara Barros

revuespirite@cei-spiritistcouncil.com

www.cei-spiritistcouncil.com

Indice

JUSSARA KORNGOLD SIMÃO PEDRO LIMA	ĈEFARTIKOLO SPIRITISMO KAJ FILOZOFIO LA MORALAJ LEĜOJ: DAŬRA KOMPASO DE LA ANIMO
ERIC NEGREIROS, MIRIAM DUSI KAJ TATIANA BARROS	SPIRITISMO KUN INFANOJ KAJ JUNULOJ 1a MONDA SPIRITISMA KONGRESO DE LA JUNULARO
SPIRITO BEZERRA	FORTIGANTE "PONTOJN DE LUMO" FAMILIAJ PAROLADOJ DE TRANSTOMBO, HODIAU
CARLOS MIGUEL PEREIRA	HISTORIA PLANO LA MIRINDA HISTORIO DE FREDERICO DUARTE
GLAUCIO PESSOA	SPIRITISMO KAJ SOCIO KAJZENO KAJ ĜIAJ SINERGIOJ KUN SPIRITISMO
REDAKTEJO DE SPIRITISMA MOMENTO	SPIRITA MOMENTO KONSCIO PRI DEVO



Jussara Korngold

JUSSARA KORNGOLD

La Voko de la Interna Devo

En *La Evangelio laŭ Spiritismo* (ĉap. 17 – “Estu perfektaj”), Lazaro memorigas nin, ke la devo estas la morala devo, kiu subtenas nin de interne kaj poste etendiĝas al aliaj estaĵoj. Ĝi estas la subtila leĝo de la vivo, teksita en la plej malgrandaj agoj kaj en la elektoj, kiuj difinas niajn vojojn, konfidita al la intima libereco de ĉiu estaĵo kaj gvidata de silenta lumturo, kiu brilas en la plej profunda angulo de nia animo.

Plenumi sian devon signifas marŝi kontraŭ la ventoj, kiuj blovas el la egoo. Ĝi estas diri “jes” al tio, kio altigas, eĉ kiam ĉio en ni sopiras al pli facila vojo. Ĝiaj venkoj ne bezonas atestantojn, kaj ĝiaj eraroj malofte ricevas riproĉon. Sekvi ĝin postulas firman volon, internan lojalecon kaj la kuraĝon esti sincera kun si mem.

Lazaro memorigas nin, ke ĉiuj estaĵoj estas egalaj antaŭ la doloro — tiu severa kaj justa instruistino, kiu egaligas kaj vekigas la kompaton. Per la komuna sperto de sufero ni lernas mezuri la ampleksos de niaj agoj. La devo komenciĝas en la momento, kiam nia ĉeesto minacas la trankvilon de iu, kaj finiĝas ĝuste tie, kie ni mem ne akceptus esti vunditaj.

Sed ekzistas pli profunda, preskaŭ sekreta dimensio, kiu nin movas. Ĝi ne estas nur la videbla devo, tiu, kiun ni plenumas en la nuna momento. Ĝi estas la *Devo* — tiel, kun majusklo — kiu fontas el la spirita memoro: la interna bezono rekonstrui vojojn, ripari tion, kio rompiĝis, transformi malnovajn erarojn en luman lernadon. Ĝi ne venas kiel puno, sed kiel invito al renkontiĝo kun ni mem. Ĝi tuŝas niajn plej sentemajn fibrojn kaj instigas nin konverti ombrojn en klarecon.

Akcepti la devon signifas kultivi karakteron; ampleksi la *Devon* signifas purigi la animon. Inter la du naskiĝas spirita matureco — tiu silenta movo de tiu, kiu decidas kreski interne, ekbruligi sian propran flamon kaj daŭrigi antaŭen kun digno — eĉ kiam la vojo postulas penon, rezignon, paciencon kaj fidon.

Ĉar estas en la interna silento, ke la transformo okazas. Kaj estas en ĝi, ke la vivo, fine, lumiĝas.

TEKSTO DE LA EKIPE N22

Teksto de la Teamo

En ĉi tiu numero ni daŭrigas la pripensojn pri la Dia aŭ Natura Leĝo, kun kelkaj reflektaj tuŝoj ĉirkaŭ la temo *Devo*. Ni rigardas la neeviteblan – kvankam foje miskomprenatan – rilaton inter la du grandaj kampoj de la Natura Leĝo: Scienco kaj Spiriteco, la fizikaj kaj la moralaj leĝoj, kun speciala emfazo pri la lastaj, ĉar ĝuste tiuj plej koncernas la Spiritismon.

Ni pripensas la reenkarniĝon kiel dian leĝon, ankaŭ eldiritan de Jesuo, la dia sendito, kiu ne venis por detrui la Leĝon, sed por malkaŝi ĝin. Ni esploras la devon de la spiritistoj disvastigi la Doktrinon kaj praktiki ĝiajn kristanajn principojn – ami unu la alian kaj instrui sin – pere de la granda festo, kiu estas la realigo de ankoraŭ unu Monda Spiritisma Kongreso kaj la unua Junulara Kongreso de tia amplekso, donante voĉon al la novaj generacioj.

Ĉion ĉi, kaj multe pli, ni ĉiuj, kiel servantoj, preparis por alporti al la leganto en ĉi tiu eldono, por ke ni ne forgesu, ke *“kun Jesuo, la devo helpi kaj pardoni, servi kaj lerni, ĉiam apartenas al ni.”*¹

KOVRILTEKSTO 22

La Devo estas la esenco de nia morala vivo. Ĝi naskiĝas en la konscienco kaj dependas nur de ni mem.

Kiel natura leĝo, ĝi similas al kodo instalita ĉe la komenco de la formado de la estaĵo – ankoraŭ simpla kaj nescipova – sur la *ĉeftabulo* de la Racio, kaj kiu evoluas laŭ la progreso de la Spirito.

Tre rafinita mekanismo, la Devo, kun ĝiaj precizaj difinoj de la nocioj Bono kaj Respondeco, estas la sola, kiu – ĝuste plenumita – kondukas nin al perfekteco. Nia elekto por la kovrilo reflektas la ideon de la Devo kiel esprimo de la dia volo en la homa konscienco.

Elstarigita Frazo

“La devo – regenerado, per kiu ni estas devigitaj produkti tute renovigajn refleksiojn de nia personeco, antaŭ tiuj, kiuj fariĝis kreditoroj de niaj partoj de ofero.”

XAVIER, Francisco C. (Emmanuel, Spirito). [s.d.] *Penso kaj Vivo*. Amadora: FEP.

¹ XAVIER, Francisco C. (Emmanuel, Spirito). 2015. *Plu Veturi la Ŝipon*. [s.l.]: Ideal.

SPIRITISMO KAJ FILOZOFIO

LA MORALAJ LEĜOJ: DAŬRA KOMPASO DE LA ANIMO



Simão Pedro de Lima

SIMÃO PEDRO LIMA

BIO:

Simão Pedro de Lima estas membro de la Spiritisma Societo Domo de la Vojo, en la urbo Patrocínio-MG (Patrosinjo/Minaso), Brazilo. Li estas preleganto kaj spiritista aŭtoro. Li profesias kiel advokato kaj universitata profesoro.

TRADUKISTO:

José Roberto Alves de Albuquerque

REVIZIISTO:

Givanildo Ramos Costa

RESUMO:

La teksto pritraktas la Dek Moralajn Leĝojn, laŭ ili estas prezentitaj en "La Libro de la Spiritoj" de Allan Kardec. Ili estas difinitaj kiel naturaj leĝoj, neŝanĝeblaj kaj universalaj, regantaj la homan konduton, kaj konsistigas la fundamenton por la spirita progreso. Ili estas diaj leĝoj enskribitaj en la konsciencon, kies celo estas la homa feliĉo.

La pritraktataj leĝoj estas: Adorado (altigo de la penso al Dio), Laboro (utila okupiĝo por la progreso), Reproduktado (daŭrigado de la specio kun respondeco), Memkonservado (devo konservi la vivon), Detruado (necesa transformo por renoviĝo), Socio (socia naturo de la homo), Progreso (neevitebla evoluo de la inteligenteco kaj moralo), Egaleco (spirita egaleco antaŭ Dio), Libereco (libera volo kaj aŭtonomio de penso) kaj Justeco, Amo kaj Karitato (sintezo kaj kronado de ĉiuj aliaj leĝoj).

Oni konkludas, ke tiuj leĝoj formas daŭran moralan kompason, gvidantaj la homaron direkte al la evoluado kaj vera feliĉo.

ŜLOSILJVORTOJ:

Moralaj Leĝoj, Spiritisma Doktrino, Spirita Progreso, Libera volo, Natura Leĝo

Enkonduko

En mondo en konstanta transformiĝo, kie valoroj kaj kutimoj ŝajnas esti tiel fluaj kiel la tempo, la homaro serĉas jam de jarcento solidan fundamenton por la vivo en socio kaj por la individua konduto. Kie trovi aron da principoj, kiuj estas samtempe universalaj, raciaj kaj kompatemaj? Profunda respondo al tiu daŭra sopiro estas proponata de la Spiritisma Doktrino, konkretigita en la baza verko *La Libro de la Spiritoj*, kies unua eldono estis publikigita de Allan Kardec en 1857.

Pli ol tiel nomata 'religia' libro, temas ĝi pri vivfilozofio, kiu kunligas la racion, la sciencon kaj la moralon. En tiu verko, en sia dua kaj definitiva eldono de 1862, Kardec, didaktike, dividis la temojn en librojn, kvar librojn, tiel nomitajn: Unua Libro – Unuaj Kaŭzoj; Dua Libro – Spirita Mondo aŭ de la Spiritoj; Tria Libro – Moralaj Leĝoj; Kvara Libro – Esperoj kaj Konsoloj.

En ĉi tiu artikolo ni enprofundiĝos en la kernon de la Tria Libro, de la demandoj 614 al 919, kie estas skizitaj la **Moralaj Leĝoj**. Tiuj leĝoj estas prezentitaj ne kiel dogmaj trudoj de punema diaĵo, sed kiel **naturaj leĝoj**, tiel neŝanĝeblaj kaj aplikeblaj kiel la fizikaj leĝoj regantaj la Universon. Ili estas la dia kodo enskribita en la homan konsciencon, kies kompreno kaj praktiko reprezentas la spiritan progreson.

Ĉi tiu artikolo celas esplori ĉiun el tiuj dek leĝoj, elprenante el la saĝeco de la Superaj Spiritoj iliajn esencojn, praktikajn implicitojn kaj ilian nedisigeblan interligitecon, konkludante per pripenso pri ĝia daŭrema rolo kiel gvidilo por la homaro.

La Naturo de la Moralaj Leĝoj: Diaj, Naturaj kaj Neŝanĝeblaj

Antaŭ ol enprofundiĝi ĉiun specifan leĝon, gravas kompreni ĝian naturon. Kardec ilin nomas "naturaj leĝoj", ĉar ili eliras el la Kreinto mem kaj regas ne nur la fizikan vivon, sed precipe la moralan vivon de la estaĵoj. Ili ne estas dia kaprico, sed esprimas de la propra inteligenteco kaj amo subtenantaj la kreitaĵon. Pro tio, ke ili estas naturaj, ili estas:

- a) Universalaj: ili aplikiĝas al ĉiuj homoj, sendepende de kulturo, epoko, kredo aŭ socia kondiĉo.
- b) Neŝanĝeblaj: iliaj fundamentaj principoj ne ŝanĝiĝas. Tio kio evoluas estas la homa kapablo ilin kompreni kaj apliki en ilia pleneco.
- c) Raciaj: eblas ilin kompreni per la racio kaj konstati per la sperto. La Spiritisma Doktrino invitas nin ne ilin blinde akcepti, sed ilin submeti al la kribriĵo de la logiko kaj observado.

Komence estas la demando 614 de *La Libro de la Spiritoj*², kie oni demandas al la spiritaj bonfarantoj: "Kion oni komprenu per natura leĝo?". Kaj la respondo estas: "La natura leĝo estas la Dia leĝo. Ĝi estas la unika kaj vera por la feliĉo de la homo. Ĝi al li indikas tion, kion li devas fari aŭ ne fari kaj li nur estas malfeliĉa ĉar li de ĝi malproksimiĝas."

² La Libro de la Spiritoj, portugalen tradukita de Evandro Noleto Bezerra el la 2-a, 4-a, 5-a, 6-a kaj 12-a francaj eldonoj. Speciala eldono – Rio-de-Janeiro: Brazilia Spiritisma Federacio, 2006. Ĉiuj citaĵoj de La Libro de la Spiritoj en ĉi tiu artikolo estas el tiu eldono ĉi tie menciita.

Al ni estas klare, ke la natura leĝo havas nur unu celon, kiu estas, la **feliĉon** de la homo. Tio implicas la ideon, ke ĉio en nia vivo estas por nia feliĉo, ke nenio okazas, kio ne permesas al ni esti feliĉaj! La feliĉo estas la Dia Leĝo, do ĝi estas en ni.

Alia grava reliefiga punkto estas tio, kio estas en la demando 615 de *La Libro de la Spiritoj*, kiu asertas: "Ĉu la Dia Leĝo estas eterna?". Kaj la respondo de la Spiritoj estas: "Ĝi estas eterna kaj neŝanĝebla kiel Dio mem.". El tiu respondo oni konkludas, ke la leĝoj de Dio estas eternaj kaj neŝanĝeblaj! Do, konsiderante ke la leĝoj de Dio estas por la feliĉo de la homo, kaj konsiderante ke ili estas eternaj kaj neŝanĝeblaj, oni konkludas ke la feliĉo estas eterna kaj neŝanĝebla.

Ankaŭ gravas memori la demandon 621 el *La Libro de la Spiritoj*, kiu diras: "Kie estas skribita la leĝo de Dio?". kaj la respondo estis: "En la konscienco.". Ni vidu, do: la leĝo de Dio estas por la feliĉo de la homo; la leĝo de Dio estas eterna; la leĝo de Dio estas skribita en la konscienco. Kion oni konkludas? Ke la feliĉo estas stato de konscienco, ĝi estas interneca kvalito.

Laŭ respondo al la demando 614, menciita antaŭe, oni vidas, ke kiam la homo foriras de la Leĝo de Dio, li fariĝas malfeliĉa, kaj, konsiderante ke la Leĝo de Dio estas en la konscienco, oni konkludas, ke kiam la homo distanciĝas de sia konscienco, li neas la feliĉon kaj mem fariĝas malfeliĉa.

La malsupraj moralaj leĝoj havas do tiun karakteron: esti pripensiga interna elemento. Kiam oni analizas la moralajn leĝojn, oni devas konsideri, ke ili estas ekstere aplikeblaj surbaze de interna pripenso, interna sento, konscienca analizo.

La Dek Moralaj Leĝoj

Allan Kardec, ĉiam atentema pri bona didaktiko, proponas al la Spiritoj la dividon de la moralaj leĝoj en dek specifajn leĝojn. En la demando 648 de *La Libro de la Spiritoj*, Kardec demandas la jenon:

"648. Kion vi pensas pri la divido de la natura leĝo en dek partojn, kiuj entenus la leĝojn de adorado, laborado, reproduktado, memkonservado, detruado, socio, progreso, libereco, egaleco, fine tiun de justeco, amo kaj karitato?"

Kaj la spiritaj bonfarantoj respondis:

"Tiu divido de la leĝo de Dio en dek partojn estas tiu de Moseo, kaj povas enteni ĉiajn cirkonstancojn de la vivo, kio estas esenca. Vi povas do ĝin alpreni, kvankam ĝi pro tio estas neniel absoluta, kiaj ankaŭ ne estas iaj ajn klasifikoj, kiuj dependas de la vidpunkto, el kiu la aferoj estas konsiderataj. La lasta leĝo estas la plej grava; laŭ neniu alia la homo povas pli rapide antaŭeniri en sia spirita vivo, ĉar ĝi resumas ĉiujn ceterajn."

Tiel komprenante, ni iru al la Moralaj Leĝoj indikitaj en la demandoj 614 ĝis 919 de *La Libro de la Spiritoj*.

1. Leĝo de Adorado (Demandoj 649-673)

La unua morala leĝo traktas la vertikalan rilaton inter la homo kaj la Kreinto. La "adorado" ĉi tie ne limiĝas al eksteraj ritoj aŭ specifaj kultoj. La Spiritoj difinas ĝin kiel "leviĝon de la penso al Dio" (demando 649). Temas pri la intuicia rekono de supera inteligenteco, el kiu ni devenas. Per adorado la homo alproksimiĝas al Dio.

La vera adorado estas interna sento, esprimata per dankemo kaj konformeco al la dia volo, komprenata kiel praktikado de bono. La preĝo estas ĝia plej pura esprimo, ne kiel egoisma peto, sed kiel ago de harmoniigo, kiu morale fortigas nin. La adorado povas esti individua aŭ kolektiva. Ĉi tiu lasta estas valida, kiam ĝi antaŭenigas unuecon kaj fratecon de sentoj kaj pensoj.

La esenco de la preĝo okazas en la intima sanktejo de la konscienco.

En epoko de kreskanta senreligiigo, la Leĝo de Adorado restas aktuala. Ĝi memorigas nin, ke spiriteco estas interna bezono de la homa estaĵo. Adori Dion estas, en la praktiko, rekoni la sanktecon de la vivo, serĉi sencon, kiu transpasas la materion, kaj konektiĝi kun io pli granda, estas la konekto inter la kreitaĵo kaj la Kreinto. Ĝi estas la leĝo kiu elprenas nin el la centro de nia propra universo kaj reenmetas nin en kosman kaj dian kuntekston.

2. Leĝo de Laboro (Demandoj 674-685)

Anstataŭ esti nur malbeno aŭ ŝarĝo, la laboro estas prezentata kiel natura leĝo kaj kondiĉo por la progreso. La spiritoj bonfarantoj klarigas, ke laboro ne konsistas nur el materialaj okupoj; ili diras, ke "ĉiu utila okupo estas laboro." (demando 675).

La laboro estas rimedo per kiu la Spirito evoluigas sian inteligentecon, akiras sperton kaj regas la materion. Ĝi estas, do, instrumento de liberiĝo. La leĝo aplikiĝas en ĉia laboro: intelekta, morala kaj fizika. Mallaboremo, en tiu perspektivo, kontraŭas la naturon kaj estas fonto de malvirto kaj malprogreso.

La Spiritoj diras, ke la laboro estas rimedo por perfektigi la homan inteligentecon, kaj ke, sen la laboro, la homo restus en la intelekta infanaĝo. Ili aldonas en la

demando 676: "Tial ilia nutraĵo, sekureco kaj bonfarto dependas de ilia laboro kaj aktiveco."

En mondo kun kreskanta aŭtomatigo kaj krizoj de senco en la laboro, ĉi tiu leĝo atentigas nin, ke la fina celo de la laboro ne estas nur la vivtenado, sed la evoluigo de la potencialoj. Digna laboro, farata kun sindediĉo kaj integreco, estas formo de karitato al la socio kaj edukado por la Spirito mem. La leĝo kondamnas la misuzon kaj ekspluatadon, sed altigas la moralan valoron de konstruema penado.

3. Leĝo de Reproduktado (Demandoj 686-701)

La reproduktado, tio estas, la Leĝo de Reproduktado estas natura leĝo, kiel ni vidis en la demando 686. Sen ĝi, "la korpa mondo pereus", tion diras la Spiritoj. Laŭ la korpa vidpunkto, la daŭrigon de la specio celas tiu leĝo, kiu estas fundamenta instinkto enskribita en la Naturo. Tamen ĝia kompreno povas iri preter la biologia nivelo kaj ankaŭ esti komprenata en la morala sfero.

La enkarniĝo celas la spiritan pliboniĝon, la progreson kaj evoluon, kiel bone klarigis la Spiritoj en la demando 132 de *La Libro de la Spiritoj*. En tiu kunteksto, reproduktado estas rimedo, kaj ne celo en si mem.

Ĝi estas dia mekanismo por la alveno de novaj Spiritoj, kiuj venas plenumi sian evoluon sur la Tero. Tial ĝi devas esti praktikata kun respondeco kaj moraleco. Geedzeco (en vasta senco) estas la socia strukturo, kiu plej bone garantias la edukadon kaj subtenon de la infanoj, kiuj estas la ĵus alvenintaj Spiritoj.

En tiu senco diras la Spiritoj en la demando 695, ke la geedzeco "estas progreso de la marŝado de la Homaro" kaj ke ĝia forigo estus "reiri al la vivo de bestoj". La geedzeco, en ĝenerala senco, devenas de matura decido inter homoj, estas amesprima reciprokaĵo kaj ne nur instinkta impulso de seksa energio.

En nuntempaj debatoj pri sekseco, familia planado kaj strukturado de familioj, la Leĝo de Reproduktado proponas gvidan principon: respondeco. La seksa instinkto estas natura, sed ĝi devas esti gvidata de racio kaj amo, neniam de malĉasteco. La fokuso devas esti sur la engaĝiĝo al la morala kaj intelekta evoluo de la idaro, komprenata kiel spirita heredanto konfidita al nia zorgo.

4. Leĝo de Memkonservado (Demandoj 702-727)

Ĉi tiu leĝo donas al ni la instinkton konservi nian propran vivon. Ĝi inkluzivas la rajton al nutraĵo, ripozo kaj protekto. Ni vidu, kio estas en la demando 702 de *La Libro de la Spiritoj*: "702. Ĉu la instinkto de memkonservado estas leĝo de la Naturo?". Kaj la respondo estis: "Sendube; ĝi estas donata al ĉiuj vivaj estaĵoj, kia ajn la grado de ties intelekto; ĉe unuj, tiu instinkto estas nur maŝineca; ĉe aliaj, ĝi estas pripensata."

Konservado estas devo, sed ne absoluta rajto super aliaj. La homo devas uzi la rimedojn de la Naturo por sia vivtenado, sed kun modereco kaj inteligenteco, evitante malŝparon kaj misuzon.

Oni povas demandi, kial ekzistas tia leĝo aplikebla al pereema mondo. Tion tre bone klarigis la Spiritoj en la respondo al demando 703, kiam ili diris: "Ĉar ĉiuj devas kunhelpi por la plenumado por la planoj de la Providenco. Jen kial Dio

donis al ili la neceson vivi. Krome la vivo estas necesa al la perfektigo de la estuloj; tion ili instinkte, senkonscie, sentas."

En tempoj de senbrida konsumismo kaj ekologia krizo, la Leĝo de Memkonservado estas alvoko al modereco kaj ekvilibro. Ĝi instruas, ke nia rajto vivi finiĝas tie, kie komenciĝas la rajto de aliaj al la samaj rimedoj. La serĉado de tuta sano kaj konscia konsumo estas modernaj esprimoj de la plenumado de ĉi tiu leĝo. Kompreni, ke la homa estaĵo kaj la medio formas ekosistemon, estas tre grave por la aplikeblo de ĉi tiu leĝo.

El vidpunkto de la homa vivo, kiam oni parolas pri la Leĝo de Memkonservado, oni povas alporti la ideon de la konservado de la vivo. Tio igas nin kompreni, ke memmortigo kontraŭas tiun leĝon. Konservi la korpan vivon, la propran vivon, estas parto de la Leĝo de Memkonservado kaj estas devo de ĉiuj zorgi, ke la korpa vivo sekvu sian naturan kurson.

5. Leĝo de Detruado (Demandoj 728-765)

Supraĵe ĉi tiu leĝo ŝajnas kontraŭ la Leĝo de Konservado. Tamen observante la demandon 728 de *La Libro de la Spiritoj*, evidentiĝas, ke ekzistas "necesa kaj providenca detruo". Ni vidu, kio troviĝas en tiu demando.

"728. Ĉu detruado estas leĝo de la Naturo?". Kaj la respondo estas: "Estas necese, ke ĉio estu detruita, por renaskiĝi kaj rekreiĝi, ĉar tio, kion vi nomas detruado, estas nenio alia ol transformado, celanta renovigon kaj plibonigon de la vivantaj estuloj.". Iĝas klare, ke la spirita vidpunkto vastigas la komprenon pri tio, kio estas la Leĝo de Detruado.

La detruo estas necesa por la renoviĝo. La morto de la fizika korpo estas la detruo de la materia envolvajo por la liberiĝo de la Spirito. La detruo de vivantaj estaĵoj por nutrado estas permesata, kondiĉe ke ekzistas bezono kaj ke ne estu kaŭzata nenecesa sufero. Tio, kion la leĝo kondamnas, estas la misuza detruo: la milito, la mistraktado de bestoj, la malŝparo, la vandalismo kaj ĉiu ago, kio detruas pli ol la neceso postulas.

La ideo pri transformiĝo estas foje demandata, kiam temas pri la tiel nomataj kataklismoj, katastrofoj, kiel tertremoj, inundoj, ekzemple. Tiuj okazoj ofte trafas homojn kaj en iuj kazoj kondukas al morto.

El tiu vidpunkto, Kardec demandis al la Spiritoj, en la demando 737 de *La Libro de la Spiritoj*, kia estus la celo de tiaj okazoj. Al lia demando la Spiritoj respondis, ke tio estas por igi la homaron progresi pli rapide, kaj ili aldonis: "Ĉu ni jam ne diris, ke la detruo estas necesa por la morala regenerado de la Spiritoj, kiuj en ĉiu nova ekzistado supreniras ankoraŭ unu ŝtupon en la skalo de perfekteco? Necesas, ke oni vidu la celon, por ke oni povu taksu la rezultojn. Ĉar vi juĝas ilin nur el persona vidpunkto, vi donas al ili la nomon katastrofoj, pro la damaĝo, kiun ili kaŭzas al vi. Tamen ofte tiuj malordoj estas necesaj por ke oni pli rapide atingu pli bonan ordon de aferoj kaj por ke oni realigu en kelkaj jaroj tion, kio alie postulus multajn jarcentojn."

Ĉi tiu leĝo instruas nin distingi inter la necesa celo kaj la senkiala kruelaĵo. Ĝi estas invito al neperforto kaj al respekto por ĉiuj formoj de vivo. En kunteksto de tutmondaj konfliktoj kaj media ruinigo, ĝi demandas nin pri tio, kion ni detruas senbezone kaj kiuj estas la moralaj konsekvencoj de niaj detruaj agoj.

6. Leĝo de Socio (Demandoj 766-775)

Laŭ tio, kion oni povas depreni el la enhavo de la demando 766 de *La Libro de la Spiritoj*, la homo estas socia estaĵo laŭ sia naturo. La izolita vivo kontraŭas lian esencon, ĉar ĝuste en la kunvivado li evoluigas siajn kvalitojn kaj korektas siajn malperfektaĵojn. Tiel, pli ol homa "inventajaĵo", tio estas homa bezono.

Neniam estis tiel evidenta la tutmonda interligiteco. Ĉi tiu leĝo asertas, ke nia individua progreso estas intime ligita al la kolektiva progreso. Ĝi kontraŭbatalas la troigitan individuismon kaj memorigas nin pri nia frateca respondeco al ĉiuj membroj de la socia korpo. La serĉo por pli justa kaj solidara socio ne estas nur politika idealo, sed morala postulo de la natura leĝo. La bezono de la vivo en socio estas natura leĝo. Estas en kontakto kun la similulo, ke ni ekzercas paciencon, toleremon, karitaton kaj amon.

En la kunteksto de la socia vivo, ni havas la familion. La familio estas la unua socia ĉelo, la ĉelo patrina, ĝi estas "miniatura socio", kie ni komencas lerni la lecionojn por bona kunvivado. Bone strukturitaj familiaj ligiloj kontribuas al strukturita socio.

La familio estas natura socio, kiu antaŭas la Ŝtaton. La socio reflektas tion, kion la aro de la familioj, kiuj ĝin konsistigas, indikas, tio estas, liberala socio estas la reflektado de la aro de liberaj familioj; konservativa socio estas la reflektado de la aro de konservativaj familioj.

En la demando 775 de *La Libro de la Spiritoj*, la Spiritoj diras al ni, ke la rezulto de la malfortiĝo de la familiaj ligiloj estus la intensiĝo de la egoismo. Tio montras al ni, ke en familio ni havas, iel, lernejon, kiu instruas al ni la solidarecon kaj la altruismen. En la lerneja programo de la familio ni povas lerni disvolvi la

komprenon, la sentemon kaj la senton, tri fundamentajn elementojn por la vivo en socio.

7. Leĝo de la Progreso (Demandoj 776-802)

Tio estas la dinamika leĝo de la kreado. Nenio restas stagnanta; ĉio evoluas, precipe la inteligenteco kaj moraleco de la Spiritoj. Se ni observas la demandon 116 de *La Libro de la Spiritoj*, ni vidos, ke la progreso estas determinismo de la leĝo de Dio. Pri tiu afero oni demandas, ĉu estos Spiritoj, kiuj restos por ĉiam en la malsuperaj ordoj de la evoluo. Al tio la Spiritoj respondis: "Ne, ĉiuj fariĝos perfektaj (...).".

Per tiu respondo klaras, ke la evoluo estas dia impulso. Ĉiuj Spiritoj havas en potencialo la ĝermon de la progreso. La progreso apartenas al la Naturo!

Tiel la progreso estas neevitebla, sed ĝia ritmo dependas de la libera volo. La homaro progresas malrapide kaj grade, pere de luktoj kaj spertoj. La intelekta progreso, pli rapida, devas esti la antaŭanto kaj faciliganto de la morala progreso, pli malrapida kaj decida. La sciencaj malkovroj kaj inventoj estas rimedoj donitaj de pli progresintaj Spiritoj por akceli la kolektivan evoluon.

Oni devas tamen memori, ke la intelekta progreso antaŭas la moralan progreson, sed tiu lasta ne tuj sekvas la intelektan progreson. Tion ni vidas en la demando 780 de *La Libro de la Spiritoj*. La demando estas: "Ĉu la morala progreso ĉiam sekvas la intelektan?". Kaj la respondo estis: "La unua estas sekvo de la dua, sed la morala ne ĉiam venas tuj post la intelekta.".

La intelekta progreso kondukas al la morala progreso, kiam ĝi kondukas al la kompreno de la bono, distingante ĝin de la malbono. Tiel okazante, la homo povas elekti, povas ekzerci sian liberan volon. La disvolviĝo de la libera volo akompanas la disvolviĝon de la inteligenteco kaj pliigas la respondecon pri la agoj.

Ĉar la progreso estas konstanta elemento en la leĝo de Dio, la homo ne povas haltigi tiun evoluon marŝon. Foje li povas ĝin malhelpi, kiam la personeco superas la kolektivan intereson de la socio. Alivorte oni povas malhelpi la progreson per egoismo kaj fiereco, la du vundoj de la homaro.

La civilizacio estas progreso, sed nekompleta progreso. Ĝi estas etapo en la evolua ŝtuparo, ĉar oni ne pasas subite de la infanaĝo al la matureco. Estas grave, ke ni observu tion, kion la Spiritoj diris respondante al Kardec pri la signoj, kiuj identigus kompletan civilizacion. (demando 793).

Jen tio, kion la Spiritoj respondis: "Vi ĝin ekkonas per ĝia evoluostadio. Vi opinias vin multe progresintaj, ĉar vi jam faris grandajn eltrovojn kaj mirindajn elpensajojn; ĉar vi loĝas pli bonajn domojn kaj portas pli bonajn vestojn, ol la sovaĝuloj.

Tamen vi rajtos diri, ke vi estas vere civilizitaj nur tiam, kiam vi forpuŝos de via socio la malvirtojn, kiuj ĝin malhonoras, kaj kiam vi vivos kiel fratoj, reciproke praktikantaj la kristanan karitaton. Ĝis tiam vi estos nur kleraj popoloj, laŭirantaj la unuan fazon de la civilizacio."

En epoko de rapidegaj teknologiaj progresoj, la Leĝo de Progreso avertas nin pri la malekvilibro. Teknologio sen moraleco estas minaco. La vera progreso ne mezuriĝas per la enlanda malneta produkto aŭ per la militforto, sed per la grado de etiko, kompato kaj justeco ĉeestantaj en la homaj rilatoj. Ni estas instigataj esti

aktivaj agentoj de ĉi tiu morala progreso; ni ne haltu ĉe senutilaj personecaj opinioj kaj arbitraj supozoj.

8. Leĝo de Egaleco (Demandoj 803-824)

Ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ Dio, ĉar ili estas Spiritoj elirintaj el la sama fonto, kun la sama potencialo de perfekteco kaj la sama destino. Laŭ la demando 115 de *La Libro de la Spiritoj*, ĉiuj Spiritoj estis kreitaj simplaj kaj nesciaj. Laŭ tio, kion oni povas depreni el la respondo donita de la Spiritoj al la demando 803, ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ Dio kaj ĉiuj direktiĝas al la sama fino, kaj Dio havas siajn leĝojn aplikeblajn al ĉiuj estaĵoj.

La absoluta egaleco estas spirita realaĵo, ne socia. La sociaj malegalecoj, de talento kaj de riĉeco aŭ de alia speco, estas provizoraj, servante kiel provoj aŭ kulp-elaĉetoj por iuj kaj kiel misioj de helpo por aliaj. La leĝo ne predikas devigan niveligon, sed la egalecon de ŝancoj kaj rajtoj, kondamnante la misuzojn kaj la subpremojn.

Tiusence virinoj kaj viroj havas egalajn rajtojn, ambaŭ havas la kapablon progresi. La ideo de malegaleco inter virinoj kaj viroj, pli akcentita en iuj landoj ol en aliaj, devenas de la falsa ideo pri vira forto. La Spiritoj diras en la demando 818 de *La Libro de la Spiritoj*, ke la antaŭjuĝa ideo pri la malsupereco de la virino estas pro la "maljusta kaj kruela regado, kiun la viro alprenis super ŝi." Ili aldonas, ke "ĝi estas rezulto el la sociaj institucioj kaj el la misuzo de forto kontraŭ malforto. Inter viroj morale malmulte progresintaj, forto naskas rajton".

La Leĝo de Egaleco estas la morala fundamento de ĉiuj movadoj, kiuj luktas kontraŭ diskriminacio, antaŭjuĝo kaj socia maljusteco. Ĝi instruas al ni, ke la diverseco, kia ajn ĝi estu, ne nuligas la fundamentan egalecon de origino kaj destino. Nia devo estas labori por mondo, kie la ŝancoj ne estu neitaj pro kondiĉo de naskiĝo, batalante kontraŭ la fiereco kaj egoismo, kiuj generas malegalecojn.

9. Leĝo de Libereco (Demandoj 825-872)

La libereco estas atributo propra al la Spirito kaj la kondiĉo por ties progreso. Sen libera volo ne estas merito nek respondeco. La libereco estas natura rajto, tamen ĝi ne estas absoluta, ĉar ĉiuj homoj bezonas unu la alian, ĉar neniuj estas memsufiĉa.

La homa libereco estas laŭgrada. Ĝi komenciĝas per la libereco agi kaj etendiĝas al la libereco pensi, kiu estas absoluta kaj netuŝebla. La plej granda obstaklo al la libereco ne estas la homaj leĝoj, sed la interna sklaveco al la pasioj, la malvirtoj kaj la malbonaj kutimoj. La vera libereco, do, estas la venko de la racio super la malsuperaj instinktoj.

Du gravaj punktoj por esti traktataj estas la libereco pensi kaj la libereco de konscienco. Ili estas du elementoj, sen kiuj la individuo ne realiĝas kiel homo.

Per la penso, la homo ĝuas senliman liberecon, ĉar la penso ne konas obstaklojn. Oni povas malhelpi ĝian manifestiĝon, sed ne la agon pensi. Ekzistas latina proverbo, kiu diras: *cogitatio poenam nemo patitur*", kio, en libera traduko, estas "neniu estas respondeca pri tio, kion li pensas". Tiu proverbo, atribuita al Ulpiano,

en la *Digesto*, povas esti aplikata en la vivo de materiaj rilatoj. Tamen, en la spirita vivo, ekzistas respondeco pri la penso.

En respondo al la demando 834 de *La Libro de la Spiritoj*, la bonfarantoj diras al ni, ke la homo estas respondeca pri sia penso antaŭ Dio. Ili diras, ke "nur Dio estas kapabla koni ĝin; Li ĝin kondamnas aŭ absolve laŭ Sia justeco.". Oni devas memori, ke la leĝo de Dio estas enskribita en la konscienco.

La libereco de konscienco estas konsekvenco de la libereco pensi. La konscienco estas intima penso, kiu apartenas al la homo kiel ĉiuj pensoj. Oni ne povas meti obstaklojn al la libereco de konscienco, ĉar nur al Dio apartenas la juĝo de la konscienco. Same kiel ekzistas homaj leĝoj por reguligi la vivon en la socio, ankaŭ ekzistas la naturaj leĝoj, kiuj reguligas la rilaton de la homo kun la Kreinto.

La libereco de konscienco estas unu el la punktoj, kiuj karakterizas veran civilizacion kaj montras ĝian progreson, montras la liberan volon. En mondo de polarigitaj opinioj kaj manipulado de homamasoj, la Leĝo de Libereco invitas nin al aŭtonomio de penso. Ĝi memorigas nin, ke nia libereco finiĝas tie, kie komenciĝas tiu de la proksimulo, kaj ke plena libereco nur estas atingata kiam niaj elektoj kongruas kun la bono kaj justeco. Esti libera ne signifas fari tion, kion oni volas, sed voli kaj fari tion, kion oni devas. En la ero (demando) 872 de *La Libro de la Spiritoj*, Kardec prezentas la Teorian Resumon pri la Motivo de la Agoj de la Homo, kiu tre valoras esti legita. Jen la sugesto.

10. Leĝo de Justeco, Amo kaj Karitato (Demandoj 873-919)

Tio estas la sintezo de ĉiuj moralaj leĝoj, la kronado de la spirita evoluo. Justeco, amo kaj karitato estas tri facetoj de unu sama morala realaĵo. Ni vidu:

- a) Justeco: Estas respekto al la rajto de ĉiu. Estas la aplikado de la ora regulo: "Ne faru al aliaj tion, kion vi ne volas, ke oni faru al vi".
- b) Amo: Estas la supera sento, kiu instigas nin agi por la bono de la proksimulo, vidante en li fraton. La amo al la proksimulo estas la plej pura esprimo de amo al Dio.
- c) Karitato: Estas la virto elstara, la praktika aplikado de la amo kaj justeco. Ĝi estas bonvolemo, indulgo kaj pardono al ĉiuj. Ĝi ne limiĝas al la almozo, sed ampleksas ĉiun ajn agon, kiu mildigas la suferon de aliulo, ĉu ĝi estu materia, morala aŭ intelekta.

Ĉi tiu leĝo estas respondo al la kompleksaj rilataj problemoj de la moderneco. Ĝi transformas la malavaran justecon en ameman justecon, kaj la asisteman karitaton en strukturitan solidarecon. Ĝi estas la principo, kiu devas gvidi ekde la malgrandaj ĉiutagaj agoj ĝis la grandaj politikaj kaj ekonomiaj decidoj.

Ĉi tiu leĝo, laŭ la spirita vidpunkto, devas reguligi ĉiujn homajn rilatojn. Ĝi devas reguligi la justecon kaj la naturajn rajtojn; la rajton je proprieto, la praktikadon de karitato kaj la amon al la proksimulo, inter aliaj.

La koncepto de karitato, sub la observado de ĉi tiu leĝo, vastiĝas. Ni havas demandon de granda graveco en ĉi tiu senco enhavitan en *La Libro de la Spiritoj*. Ĝi estas la demando 886. En ĝi oni demandas: "Kio estas la vera senco de la vorto

karitato, tia, kia Jesuo ĝin komprenis?". La respondo estis rekta: "Bonvolemo al ĉiuj, indulgo al la nesuperecoj de la aliaj, pardono de la ofendoj."

En mondo de indiferenteco, la Leĝo de Justeco, Amo kaj Karitato estas la antidoto, invitante nin konstrui civilizacion bazitan sur universala frateco.

Konkludo: La Daŭropovo de la Moralaj Leĝoj

Kiam ni iras laŭ la vojo desegnita de ĉi tiuj dek leĝoj, evidentiĝas, ke ne temas pri arkaika kodo aŭ pri manlibro de reguloj por pia vivo. La Moralaj Leĝoj de *La Libro de la Spiritoj* konsistigas kosman arkitekturon por la evoluo de la konscienco.

Ili daŭropovo ne kuŝas en tio, ke ili estu skribitaj sur ŝtono, sed en tio, ke ili estu enskribitaj en la konsciencon de ĉiu homo, kvankam ankoraŭ latente ĉe multaj. Ili estas la GPS de la animo, ĉiam aktiva, ĉiam montrante la direkton al kresko, harmonio kaj vera feliĉo. Civilizacioj aperas kaj malaperas, teknologioj revoluciigigas, kulturo transformiĝas, sed la bezono adori, labori, ami, esti justa kaj vivi en socio restas neŝanĝita.

La grandeco de la spirita vidpunkto kuŝas en tio, montri, ke ĉi tiuj leĝoj ne estas ŝarĝo, sed invito al liberiĝo. Ilin kompreni kaj vivi ne estas blinda submetiĝo, sed ago de inteligenteco kaj memamo, ĉar tiu, kiu ilin sekvas, fakte sekvas la propran leĝon plej profunde de si mem.

Do, la Moralaj Leĝoj estas, kaj ĉiam estos, la neŝancelebla fundamento sur kiu ni povas konstrui signifoplenan individuan vivon kaj pli luman kolektivan destinton. Ili certigas al ni, ke, kiom ajn turbule estas la akvoj de la historio, kiom ajn kompleksaj fariĝu la defioj de la ekzisto, la morala kompasoj restas tie, montrante

kun neevitebla klareco la Nordon de la Racio kaj de la Amo. Al ĉiu el ni apartenas la tasko lerni legi ĝin kaj, kun kuraĝo kaj persisto, sekvi ĝian vojon.

SPIRITISMO KUN INFANOJ KAJ JUNULOJ

1a MONDA SPIRITISMA KONGRESO DE LA JUNULARO

FORTIGANTE "PONTOJN DE LUMO"



ERIC NEGREIROS, MIRIAM DUSI KAJ TATIANA BARROS

BIO:

Eric Negreiros, Miriam Dusi kaj Tatiana Barros – Monda Junulara Komisiono de la Fako pri Infaneco, Junularo kaj Familio de la CSI.

La 4an kaj 5an de oktobro 2025, **Punta del Este, Urugvajo**, fariĝis scenejo de historia mejloŝtono por la Spiritisma Movado: la **1a Monda Spiritisma Kongreso de la Junularo**, organizita de la **Internacia Spiritisma Konsilio (ISK)**.

Pli ol 90 junuloj, inter 13 kaj 25 jaroj, kunvenis en festo de frateco kaj lernado, reprezentante dek landojn: Germanio, Argentino, Brazilo, Bolivio, Kubo, Usono, Gvatemalo, Svislando, Urugvajo kaj Venezuelo.

La evento estis organizita de la **Monda Junulara Komisiono**, teamo apartenanta al la **Areo pri Infaneco, Junularo kaj Familio de la ISK**. Entute, 30 faciligantoj kaj kunlaborantoj partoprenis rekte en la agado, alternante inter la hispana, la portugala kaj la angla — tamen unuiĝintaj kaj flue esprimantaj sin en la universala lingvo de amo.

Ekde la komenco, la planado de la evento estis plenigita per granda ĝojo. La certeco, ke la Kongreso atingos sennombrajn junajn korojn — enkarnigitajn kaj senkorpajn — vekis kontraŭan entuziasmon.

La konstru-procezo estis markita per unueco kaj spirito de kunlaboro de la **Junulara Komisiono de la Areo pri Infaneco, Junularo kaj Familio de la ISK (AIJF/ISK)**. Malgraŭ la geografiaj distancoj kaj la lingvaj diferencoj, la semajnaj plan-kunvenoj fariĝis sublimaj momentoj de unuiĝo kaj proksimiĝo de la koroj — renkontpunktoj, kie kreemo kaj amo multiĝis por atingi la celitajn idealojn. La sento de frateco kaj la firmigo de komuna laboro fariĝis veraj devizoj, favorante horizontan sinkronion inter ĉiuj membroj kaj vertikalan sintonion kun la spirita teamo, serĉante harmonion kun la lumaj celoj de la evento.

De la administra organizado — disvastigo, aliĝoj, loĝistiko, komunikado — ĝis la doktrina organizado — temaro, metodologio, programado, ceremonio, arto — ĉiu ago estis zorge kaj kolektive planita, celante proponi al la junuloj signifoplenajn kaj emociajn momentojn de lernado, pripensado, kunvivado kaj frateco.

Al la **Organiza Komisiono** aldoniĝis, ĝustatempe, la sindonaj kaj amoplenaj teamoj de faciligantoj kaj komunikado, kiuj, en siaj respektivaj gravaj taskoj, inspiriĝis de la mesaĝo de la apostolo Paŭlo el Tarso: "Kaj kion ajn vi faras, faru ĝin el la koro" (Koloseanoj 3:23-24).

La amoplenaj vibroj, kiuj trapenetris la tutan planadon, favoris fratan etoson jam antaŭ la evento, konstruante "lumajn pontojn" inter la koroj, kiuj transpasas ekranojn kaj lingvojn.

La monato oktobro alvenis, kaj la granda tago ekbrilis. Post unu jaro de intensa dediĉo, ĉio realiĝis. La agadoj disvolviĝis kun engaĝita, sentema kaj vigla junularo. Arto kaj studo interplektiĝis, vekante emociojn kaj renovigante esperon. Malantaŭ la kulisoj, la rigardoj kaj gestoj de la volontuloj montris mesaĝojn de amo, laboro kaj dankemo, dediĉitajn al kreo de bonvena, amika kaj pripensema etoso.

Inspirite de la ĉeftemo de la **11a Monda Spiritisma Kongreso – Vivo post la Vivo**, la Junularo spertis riĉan programon dividitan en kvar temajn modulojn, konsistantajn el dialogaj, interagaj kaj pripensigaj spertoj, bazitaj sur la Spiritisma Doktrino: **"Mi, la Senmorta Spirito"**, **"Mi kaj la Spirita Mondo"**, **"Mi kaj la Vivo de Amo"** kaj **"Mi, la Spiritismo kaj la Regenerado de la Tero."**

La agadoj, studoj kaj spertoj celis atingi la **"kapon"** (doktrina scio/raciigita fido), la **"koron"** (morala pliboniĝo/sperto de amo) kaj la **"manojn"** (socia transformo/laboro en la bono) de la partoprenantoj, invitante ilin al vojaĝo de memkonado kaj interna fortigo por la serĉo de vera feliĉo. Per **vojaĝa taglibro**, la junuloj povis sekvi la programon kaj registri la pripensojn kaj lernojn de sia propra spirita vojaĝo.

Tia "vojaĝo" enhavis ankaŭ specialan pakajon — **"ŝnursakon"** — en kiu la partoprenantoj konservis objektojn akiritajn dum la agadoj, simbolante gravajn instruojn.

- **la kraĵono de memkonado**, invitante al la ekzercado de interna reformo;
- **la eta poŝlampo**, simbolo de la lumo donita de la scio;
- **la kompas**, memorigante ke Jesuo estas la sekura gvidanto de la Homaro;
- **la spegulo**, inspirita de la invito de la Majstro — "Brilu via lumo" (Mateo 5:16) — instigante la valorigon de la *mi*, kaj ne nur de la *memfoto*;
- **la perlo**, inspiranta gravajn pripensojn pri interna transformo;
- **kaj la luma koro**, simbolo de la daŭra serĉado de memlumigo per la travivado de amo.

Por fari tiun vojaĝon eĉ pli kortuŝa, la artaj momentoj estis plenigitaj de signifo kaj emocio, esprimitaj per muziko, teatro kaj poezio. La teatra scenaro montris junajn spiritojn en preparado por reenkarigi, gvidatajn de spirita mentoro al la Kongreso, kun prezentado de uruguayaj junuloj.

La sontrako de la evento — la kanto **"Pontoj de Lumo"** — fariĝis himno kaj sintezo de la komuna sento, kies versoj resonas la esencon de universala frateco: "Ne plu ekzistas limoj en nia hejmo, ĉar ni estas unu planedo por esti amata."

Krom la specifaj momentoj, la programo de la Junularo ankaŭ inkluzivis du momentojn dum la Ĝenerala Plenara Sesio de la Kongreso, kiam la Junulara Komisiono prezentis belajn momentojn de pripenso kaj arto.

- 1) **Literatura kaj Muzika Pripensado pri Vivo post Vivo**, plena je poezio, muziko, pripenso kaj harmonio, traktante la senmortecon de la animo kaj la devojn de la Spirito en ĝia evolua vojaĝo.
- 2) **Ronda Tablo “Ŝultro al Ŝultro, Flanko ĉe Flanko: La Individua kaj Kolektiva Devo antaŭ la Regenerado de la Tero”**, speciala momento de interŝanĝo de pripensoj pri unueco kaj Unuecigo, trapenetrata de arto.

La tagoj de la Kongreso pasis rapide, sed la vibroj ankoraŭ resonas en la animoj de tiuj, kiuj povis sperti tiun veran feston de lumo. La evento fariĝis lumturo, radiantamona kaj pacon al la tuta planedo, atingante la korojn de enkarniĝintaj kaj senkarniĝintaj estaĵoj, en la senfina ciklo de “Vivo post Vivo”.

Post la fino de la evento, dum la partoprenantoj pretigis sin por reveni hejmen, silenta kaj profunda emocio ŝvebis en la aero: la koroj de la laborantoj, post monatoj da dediĉo, ne sentis finon, sed certecon de daŭrigo — sur la spiritaĵoj konstruitaj kaj fortigitaj de la ĝoja pulsado de la renkontiĝoj tie spertitaj. Tio estis la certeco pri supera engaĝiĝo por konstante fortigi la fratajn ligojn unuiĝintajn per komunaj idealoj.

Unueco kaj Unuigado — valoraj standardoj de nia Spirita Movado — estis spertitaj ne nur en la rezultoj de la Kongreso, sed dum la tuta procezo de ĝia koncepto kaj konstruo, per la firmigo de amikaj kaj afektaj ligoj, unuiĝintaj kaj fortigitaj por la celoj de la regenerado de la Tero, komencante per la regenerado de la koroj. La Monda Spirita Junulara Komisiono daŭrigas tiel, kun la koroj en preĝo kaj la manoj en laboro, intensigante siajn agojn kun la junularo kaj jam prepariĝante por estontaj Kongresoj, inspiritaj de la kanto:

“Ni estas punktoj de tiu lumo, konstelacioj.

Ni estas punktoj de Jesuo en la dimensioj.

Senmortaj lernantoj, kiuj iras kaj revenas,

Ĉi tie kaj tie, farante la bonon.”

Renovigante amon, ĝojon kaj dankemon — venu la sekvaj renkontiĝoj!

FAMILIAJ PAROLADOJ DE TRANSTOMBO, HODIAU

TRADUKISTO:

J. Korngold (ISK-USSF)

Filoj kaj filinoj,

Kiel paroli pri novaj taskoj, kiam ni ankoraŭ devas plenumi la novan ordonon:
“Amu unu la alian, kiel Mi vin amis.”

Jarcentoj pasas, kaj la pripensoj pri Spiritismo ankoraŭ troviĝas sur malvarmaj paĝoj kaj, ofte, en malplenaj paroloj. En ĉi tiu momento, kiam la Tero postulas manojn pretajn por labori, ni devas, kune, realigi en la praktiko la ordonojn de la Sinjoro.

Ni vidas ĉi tie kunigitajn animojn de diversaj nuancoj — animojn serĉantajn, animojn pretajn por la servo, animojn senlacajn kaj dediĉitajn al la bono. Sed ĉiam estos necese forigi el niaj intencoj ĉion, kio malhelpas, ke ĉi tiu amo — eĉ pli granda ol la amo al la proksimulo kiel al ni mem — povu atingi la tutan homaron.

Dum la tempo pasas, ĉu ni vere montras tion, kion Jesuo volis de ni, kiam la Bona Nova atingis niajn korojn kaj mensojn?

Se ni opinias, ke sufiĉas ĉiam pensi, ĉiam paroli kaj teoriadi — en senfinaj enkondukoj kaj klarigoj — kaj tiel, dum la tempo disvolviĝas, ni nur turniĝas ĉirkaŭ la sama celo, deziro kompreni anstataŭ komenci labori en la Vinberejo de la Sinjoro, tiam ni malsukcesas.
Kaj kio fariĝos el ni?

Ĉiuj ĉi demandoj, miaj infanoj, celas, ke ni efektive transformu tion, kio estis temo, en **vivan verkon de la Evangelio**.

Vivi Jesuon estas pli ol urĝe; **meti Jesuon kiel modelon kaj gvidanton** estas tuja flago por ni, spiritistoj.

Ke la spiritoj-spiritistoj kunigitaj ĉi tie portu en siaj koroj kaj mensoj, el ĉi tiu spektaklo de lumo kaj beno, lecionojn de praktika vivo.

Ni ne perdu tempon, ĉar tempo estas tio, kio efektive kalkulos en niaj vivoj de kresko kaj spirita progreso; estas la tempo, kiu permesos, ke kune ni trovu la feliĉon promesitan al la homo de bono. Detaloj, konfliktoj, etaj disputoj — ofte de persona naturo — prokrastas sur la Tero la realiĝon de tio, kio kondukos la mondon al plena regenerado.

Ni ne povas kredi, ke ĉio okazos laŭ la natura fluo; **ni estas metiistoj de la Plejalta**, kaj dum ni marŝas tra sinsekvaj vivoj, la Patro atendas, ke nia kunlaboro alvenu, por ke tiam realiĝu la **Mondo de Regenerado**.

Lumaj tagoj alproksimiĝas — tagoj de okazo por kresko, tagoj de scio aplikata, tagoj de fortaj brakoj, de bona kuraĝo kaj de entuziasmo — kiuj karakterizos la infanojn de Dio sur la Tero. La Regno de la Sinjoro estas proksima al establiĝo, sed ĝi estos **en la koro de la homo**, ne en la eksteraĵo de la materio, kie ĝi restos eterne, ĝis estos atingitaj la feliĉaj kaj benitaj mondoj.

Transiro signifas la momenton por agi, por ke la pasinteco iom post iom foriĝu kaj la estonteco prezentigu pli proksima kaj pli konkreta.

Atendu, miaj filoj kaj filinoj — sed ne atendu en pasiveco aŭ senaktiveco. Atendu **laborante**, ĉar tiel Jesuo volas por ni.

Ke la Sinjoro de benoj vin benu.
El Lia amo venu senfinaj lumoj de klereco kaj amo.

Multe da paco de via humila kaj patra servanto,
Bezerra

La mediumo :

Alexandre Silva

Spirita Konsilio de la Ŝtato Rio-de-Janeiro – CEERJ – Brazilo

HISTORIA PLANO

LA MIRINDA HISTORIO DE FREDERICO DUARTE



Carlos M. Pereira

CARLOS MIGUEL PEREIRA

TRADUKISTO:

J. Korngold (ISK-USSF)

RESUMO:

Dum la unua duono de la dudeka jarcento, viro el Trás-os-Montes, kiu elmigris al Mançestro, fariĝis raportisto pri la mediumaj fenomenoj, kiujn li atestis dum la viglaj seancoj de la britaj spiritualistoj. La spiritisma movado forgesis ĉi tiun homon, sed lia vivo estas plena je mirigaj fenomenoj, tragedioj kaj enigmoj — tiel, ke ĝi preskaŭ ŝajnas esti rakonto el fikcio.

ŜLOSILVORTOJ:

Mediumeco; Historio; Spiritismo; Mançestro; Ĵurnalismo; Dua Mondmilito.

La **3-an de junio 1955**, la portugala spiritisto **Isidoro Duarte Santos**³ vizitis **Ĉikon Xavier** en **Pedro Leopoldo**⁴. La renkontiĝo estis historia kaj rezultigis memorindan mediuman seanceton, konservitan en sonregistraĵo de preskaŭ unu horo.

Je certa momento, la mediumo el Minas Gerais⁵ menciis, ke **Faure da Rosa**⁶, mortinta kvin jarojn pli frue, montris sin zorgoplena pri sia amiko **Frederico Duarte**, petante preĝojn por li. **Faure da Rosa** estis elstara kaj rekonata figuro de la portugala spiritisma movado komence de la dudeka jarcento, sed **Frederico Duarte** estis tute nekonata.

Neniu el la “profesoroj” de spiritismo, kiujn mi konis, rekonis tiun nomon, kaj eĉ **Manuela Vasconcelos**, eminenta esploristino pri la historio de Spiritismo en Portugalio, ne sciis, kiu povus esti tiu persono.

³ **Isidoro Duarte Santos (1896–1974)** – Leŭtenanto de la Portugala Mararmeo, li estis fondinto de la revuo *Estudos Psíquicos* (*Psikaj Studoj*), direktoro de la *Centro Espiritualista Luz e Amor* (Spirita Centro “Lumo kaj Amo”), kaj la unua prezidanto de la *Portugala Spiritisma Federacio* post la revolucio de la 25-a de aprilo 1974, kiu finis pli ol kvardek jarojn da diktaturo.

⁴ Urbo en la interna regiono de la ŝtato Minas-Ĝerajso en Brazilo, kie naskiĝis kaj vivis ĝis 1959 la mediumo **Ĉiko Ĥavier**.

⁵ **Francisco Cândido Xavier**, ankaŭ konata kiel **Ciko Ĥavier**.

